

# Aparta opinio de Sergio Pokrovskij pri «okazo» kaj «kazo»

Mi malkonsentas kun la opinio de la sekcia plimulto pri la ekstergramatikaj signifoj de «kazo». Samkiel Zamenhofo, Kabe kaj la Akademio (en ties «Akademiaj korektoj») mi opinias, ke preferindas lasi al «kazo» nur ties fundamentan signifon gramatikan.

Miajn argumentojn mi detale prezentis en mia studaĵo «[Okazo kaj kazo](#)», disponebla rete kaj publikigita en «La ondo de Esperanto» (n-roj 234–236, aprilo—julio 2014). Probable malmultaj kolegoj havos sufiĉan paciencon por legi la tutan studaĵon, tial mi resumos kaj referencos kelkajn ties tezojn malsupre.

## La historio de la problemo

En la klasika Esperanto, ĉe Zamenhofo kaj Kabe, la vorto «kazo» havas nur la signifon gramatikan (deklinacian). La Akademio konstatis tion per siaj [korektoj al UV](#).

Aliajn signifojn de la franca «cas» — medicinajn, logikajn ktp — Zamenhofo esprimis kiel figurajn signifojn de la vorto «okazo» (ilia uzo en la franca «cas» estas tia sama tropo). Tiun praktikon la Akademio konservis en siaj oficialaj tekstoj.

Tamen en la jaro 1930<sup>a</sup>, tute senaverte, [PV atribuis](#) al «kazo» la signifojn de «okazo», malgraŭ la tradicio kaj la Akademia korekto. Okazis paŭsaĵo de la ekstera formo de la vortoj:

- *cas* = *kazo*
- *occasion* = *okazo*

tute same, kiel en la parodia «[Karaj papo kaj mam](#)».

De tiam la vortaroj kopiis la version de PV, kaj oni havis la impreson, ke tio estas la norma uzo laŭfundamenta. Nur konscia malplimulto el la homoj, kiuj serioze studis la klasikan lingvon, konservis la klasikan uzon (interalie G. Waringhien, B. Wennergren).

## Kio estas la ĝusta solvo?

Por ĝuste solvi la problemon necesas respondi kelkajn demandojn:

1. Ĉu la zamenhofa uzo estas bona?
2. Ĉu reveno al la zamenhofa uzo estas ebla?
3. Ĉu homonimigo de «kazo» estas dezirinda?

En la sekciaj debatoj tiuj demandoj neniam estis prezentitaj formale, kvankam sporade ili estis diskutataj. Ĉiel ajn, estis nenia formala decido pri ili, kaj la debato restis apriorie malvenkisma.

Miaj respondoj estas: Jes, Jes, Ne. Almenaŭ du kolegoj (A. Shlafer kaj M. Cramer) respondas la unuan demandon nee (ili opinias ke *okazo* ne taŭgas por la signifo logika; mi ne povis kompreni, kial *kazo* estus iel ajn pli bona por tiuj signifoj, konsidere ke iliaj objektoj kontraŭ *okazo* egale validas pri *kazo*).

## Falsa dilemo

Jam post la debato, ĉe la voĉdono, B. Wennergren jene eksplikis sian malvenkismon:

Mia preferordo:  $C > A > B$

Mia propra uzo ĉiam estis laŭ A, kaj principe mi preferus se A povus venki en la efektiva uzo, sed mi estas konvinkita, ke rekomendado de A fare de la Akademio estus plene vana ago sen ajna rezulto (krom eble mokado...). La tempo, kiam tia plena reiro al la Fundamenta «kazo» estis ebla, jam delonge pasis. Prefere ni faru rekomendon, kiu helpas ordigi kaj klarigi la nebulecan staton pri «okazo» kaj «kazo». Tia estas C. Mi malpreferas B, ĉar ĝi estas tro nebula kaj sendecida.

Sed tio estas falsa dilemo. Nenio urĝas, ke la Akademio tuj diru «jes aŭ ne» al la kazula defio. Nun regas neinformita (aŭ, pli ĝuste, misinformita) misuzo de *kazo*. Publika debato povus ŝanĝi tion. Similaj ekzemploj ekzistas en la naciaj lingvoj (mi povus indiki plurajn sukcesajn ekzemplojn pri la rusa). Mi komprenas, ke la Akademio ne kuraĝas defendi la principojn, antaŭtimante mokojn. Sed nenio devigas la Akademion tuj elpaŝi oficiale. Publikan debaton akademianoj povus konduki kiel privataj esperantistoj. Mi mem nun publikigas tian mian privatan studaĵon en LODE. Kial kapitulaci senobjete, humile, sen provi konsciigi la publikon?

Fakte tio estas malestimo al la publiko, rifuzi al ĝi ŝancon preni informitan decidon.

## La Sekciaj proponoj speciale

La Sekcio laboris super *okazo* kaj *kazo* eksterordinare longe, sed la rezulto estas nekompleta.

Unue, endus prilabori la tutan okazo-familion, kun la vortoj **hazard<sup>2</sup>o**, **akcident<sup>2</sup>o**, **event<sup>8</sup>o**, **eventual'a**, **fakt'o**, **fenomen'o** ...

Due, la traktado de *okazo* estas iom malekvilibra: elstaras la trajtoj konkurencaj kun la ekstergramatika *kazo*; sed nesufiĉe ellaboritaj estas la ceteraj signifoj (interalie, mankas difinoj pri la derivaĵoj, ekz-e *okaza*, *porokaza*, *okazigi* ktp).

Trie, iuj detaloj estas almenaŭ dubindaj. Ekz-e, la Varingjena frazo aperas kiel ilustraĵo ĉe «okazo.3.b», kiel «pritraktata afero»:

oni faris enketon pri ŝatateco de poeziaĵoj verkitaj en la franca, sed en la **okazo de Esperanto**, kies plej elstaraj poeziaĵoj estas malmulte konataj, tia enketo ne estas farebla ...

Fakte ĝi ilustras alian signifon (okazo.3.a, «aparte konsiderata situacio»): «en la *situacio de Esperanto* tia enketo ne estas farebla» (kaj simile pri la aliaj ekzemploj pri tiu signifo, kiuj iĝas «ne rekomendataj» ĉe la sekcia interpreto, kaj estas rekomendindaj ĉe la interpreto laŭ okazo.3.a).

## La kazoj franca kaj angla

La franca *cas* esence estas subnocio de *okazo* (plus la homonimo gramatika). La angla *case* estas konglomeraĵo de kelkaj signifoj de *okazo* plus kelkaj signifoj de *afero* (precipe *juĝafero*) plus diversaj aliaj signifoj. Al mi ŝajnas, ke la kolegoj tiun diferencon ne konscias. La sekcia propono estas anglece pelmela.

Kiam la vortaroj esperanta-franca kaj esperanta-angla indikas, ke

**kaz•o** (gr méd dr) cas

**kaz•o** (gram; med; law) case

la simileco estas trompa. Franclingve la jura signifo de *cas* fakte ne estas speciala, ĝi estas la komunlingva signifo situacia. Malkiel la angla ĝi ne signifas *proceso*, *juĝafero* (tiun signifon povas havi similsona vorto *cause*: «*plaider une cause*», «*gagner sa cause*» ktp). La ekzemplan frazon el

PV:

la leĝo ne antaŭvidis tiun kazon

esperantistaj juristoj kun la deveno latinidlingva kaj rusa unuflanke, kaj ĝermanlingva aliflanke, interpretas malsame (empiria fakto). [En mia studaĵo](#) mi prezentas komparon de malsimila lingvaĵo uzata por *cas prévu par* en dulingvaj juraj dokumentoj francaj kaj anglaj.

Sen aparta formala debato kaj decido la Sekcio aliĝis al la konfuza interpreto ĝermana.

Revenante al la kompleta traktado de la tutaj koncernaj familioj, mi sugestas ke krom difino de *hazardo* ktp tia traktado devus inkluzivi oficialigon de la vorto «procezo» kaj limigan difinon de «proceso» — kio fakte sekvas el la franca traduko de UV:

**proces**•: procès | lawsuit, process | Process | процесс | proces, sprawa.

## Lingvopolitiko

Varingjeno en PIV provis iom ripari la troan misuzon de *kazo*, redukti ĝin al faka terminaro. Tiu provo plene fiaskis, ĉar

- ne eblas klare disigi la signifojn de *cas(e)* kaj *okazo*, ĉar la semantika kampo de *cas(e)* plejparte koincidas kun la klasika *okazo*;
- en la tradukvortaroj la fakajn markojn «medicino, juro» oni perceptas ne kiel limigilojn, markojn de faklingvo — sed kiel indikilojn pri la celata subsignifo; t.e. ke ekz-e **case** temas ne pri skatolo aŭ uskleco, sed pri la signifoj uzataj **interalie** en juro kaj medicino.

## Decido senutila

La ĉi-supre diritan pli detale mi klarigas [en mia studaĵo](#). Surbaze de tiu sperto mi povas antaŭdiri, ke la sekcia propono havas ankoraŭ malpli multe da ŝancoj prosperi ol la difino de la PIV-oj.

La PIV-a difino estas pli preciza kaj klara ol la sekcia propono. Tamen ĝi neniel efikis la esperantistaron: la kazuloj plu uzas la vorton «kazo» en diversaj signifoj kiujn la PIV-oj ne agnoskas. La sekcia propono nenion ŝanĝos en la tradukvortaroj.

B. Wennergren volis, ke «ni faru rekomendon, kiu helpas ordigi kaj klarigi la nebulecan staton pri *okazo* kaj *kazo*». Ĉu la propono atingas tion? Jen kelkaj testaj ekzemploj: frazoj anglaj kaj frazoj esperantaj. Ĉu la propono helpas elekti inter «okazo» kaj «kazo»?

1. This is a case of mistaken identity.
2. In the best case scenario we will arrive by midnight.
3. This is the worst-case strategy.
4. What would you do in my case?
5. It's a classic case of bad planning.
6. The company only dismisses its employees in cases of gross misconduct.
7. to win a case
8. La akuzativon ni uzas nur en tri okazoj: ... (LR 73)
9. Tamen en la okazoj, kie la difino apartenas precize nek al substantivo aŭ pronomo, nek al verbo ... (LR 82A)

10. tial ni povas tre bone uzi tiun ĉi prefikson (*ge-*) en *ĉiuj okazoj*, kiam ni parolas pri ambaŭ seksoj (LR 6)
11. (iom ŝerce) anstataŭ «parolo» oni devas en tia *okazo* diri «antaŭpublikparolataĵo» (LR 11/9)
12. la personoj, kiuj nepre deziras diferencigi la francajn «instruire» kaj «enseigner», povas tre bone en *la unua okazo* uzi «instrui» kaj en *la dua* «lernigi» (LR 12/120A)
13. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia *okazo, se as, is* ktp signifus «estas», «estis» (LR 15/119)
14. en *abstraktaj okazoj* ni ofte povas uzi unu esprimon anstataŭ la dua (LR 26/123)
15. mi ne parolas pri specialaj teknikaj *okazoj*, kiam tio eble estas necesa (LR 45/60)
16. sed la lingvoj slavaj kaj germana uzas en la dirita *okazo* la pasivon pasintan (LR 48/110)
17. *en tiu kazo* mi prenas pluvombreton [PV]
18. Mi same konservis la formojn kun *ĥ*, kvankam en pluraj *okazoj* (ekz. *ĥemio, meĥanismo*) la nuna uzado pli kaj pli decideme preferas la formojn kun *k*.  
[G. Waringhien: Antaŭparolo al PIV, p. xii] (*okazoj* = vortoj)

(Mi mem ne certas, kion oni uzu surbaze de la proponita rekomendo. Plurfoje mi demandis la proponantojn, kaj la rezulto preskaŭ ĉiam estis por mi surpriza. Cetere, la opinioj de la proponintoj variis en la tempo.)

Tradukvortara difino surbaze de la tradicio klasika estas nemiskomprenebla:

**kaz•o** (*gram*) case

La «plurfakaj tradukoj» kiel la *ĉi-supraj* ĉiam restos misgvidaj, kiel mi klarigis *en mia studaĵo*.

## Decido malutila

Miajn objetojn kontraŭ la ekstergramatikaj uzoj de *kazo* motivas ne religia kulto de la Fundamento aŭ Zamenhofo, sed la malracieco de tiaj uzoj. Kontraste, mi senhezite aprobas la enkondukon de *hazard<sup>2</sup>o*, vorto kiu utile kaj klare transprenis unu el la eksaj signifoj de la zamenhofa *okazo*.

Ne tiaj estas la ekstergramatikaj signifoj de *kazo*. Ili ne prezentas unu klaran koncepton, kaj iliajn multajn signifojn plejparte kaj pli klare kovras la fundamentaj vortoj *okazo* kaj *afero*.

La sekcia propono ne solvas la problemon kiun vorton oni preferu, ĉu «kazo»n aŭ «okazo»n. En multaj — sed ne ĉiuj — okazoj ĝi allasas ajnan el ili. Ĝusta uzado de la vortoj «okazo» kaj «kazo» iĝas en Esperanto pli malfacila kaj kaprica, ol en la nacilingvoj.

La vorto «kazo» ricevas plurajn senrilatajn signifojn: deklinacia formo; okazo; proceso. Ankaŭ por la nocio «proceso» aldoniĝas senbezona kaj neinternacia sinonimo «kazo», kio malfaciligas la juran lingvaĵon (tiom pli ke diversnaciaj skoloj atribuas al ĝi malsamajn signifojn jurajn).

La sortimento da valoroj, kiujn la propono atribuas al «kazo», ne estas bazita sur tradicio de iu ajn nacia lingvo (interalie, ĝi estas pli vasta ol tiu de la franca *cas*, kaj malpli vasta ol tiu de la angla *case*); ĝi ne respondas al iu ekzistanta tradicio esperantista (pli vasta ol la difinita en la PIV-oj, malpli vasta ol ĉe la kazuloj). Ĝi aspektas kiel tute arbitra decido. Malprobablas, ke ĝi reale efikos la vortuzon de la kazuloj; sed ĝi malfaciligos revenon al la racia sistemo zamenhofa.